

La programita instruado de Esperanto en Svislando, raporto de Claude Gacond
por la Internacia Konferenco pri Interlingvistiko en Paderborn (24-28.11.1976),
4-a parto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 687, 1976.12.08 & 10 & 11

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni hodiaŭ konkludos nian raporton pri la programita instruado de esperanto en Svislando, alportante al vi kelkajn klarigojn pri la funkciado de du kursoj.

A.- Unue ni rakontos, kiel funkcias la Perkoresponda kurso programita por franclingvanoj.

Cl.- Ĝis nun eldoniĝis 13 lecionoj de tiu ĉi kurso, kiu kondukas la gelernantojn al la kapablo memverki facilan leter-tekston, legi libron kiel **Aventuroj de pioniro** de *Edmond Privat* kaj kompreni ne fakan konversacion. La plej originala karakterizaĵo de tiu ĉi 13-leciona kurso ege kompleta kaj detala estas, ke ĝi estas absolute senpaga.

A.- Ĝia unua leciono estas ricevebla en dokumentujo pri esperanto. Tiu ĉi dosiero enhavas la ĉi-sekvajn dokumentojn :

a) 10-paĝan informilon pri esperanto titolitan *Qu'est-ce que l'espéranto?*, kiun verkis juna ĝeneva lingvisto kaj kiu alportas sciigojn pri la ĉefaj esperanto-societoj en Svislando kaj tre detalajn informojn pri la lingvo mem, ties karakterizaĵoj kaj ties nuna disvolviĝo ;

b) la kurson mem kun uzklarigo kaj testfolio ;

c) informilon pri la eduk-kvalitoj de esperanto : *L'espéranto, un joyau éducatif méconnu*, artikolo de Claude Piron, instruanto en la fakultato pri psikologio kaj eduksciencoj en la Ĝeneva Universitato;

ĉ) katalogeton de la libro-servo de Kultura Centro Esperantista ;

d) fine prospekton turisman en esperanto, kiu montras kiel la lingvo aspektas.

Cl.- La plimulto de la ricevantoj de tiu ĉi dosiero studas la provlecionon kaj resendas la testfolion. Tiam aŭtomate ili senpage ricevas la duan lecionon, kiun akompanas almenaŭ tri dokumentoj : franclingva artikolo pri la aktiveco de Kultura Centro Esperantista aŭ pri la internacia lingvo mem ; informilo pri esperanto-aranĝo kaj specimeno de la ĉefaj esperanto-organoj. Tiel estas por ĉiu leciono, kiun ĉiam konkludas test-folio, kies resendo donas la rajton senpage ricevi la venontan lecionon.

A.- Vi certe faras al vi demandon. Kiel financiĝas tiu ĉi agado ? La afero estas tre simpla. Se lernanto seninteresiĝas pri la kurso, li fakte ne kaŭzis multajn elspezojn, kaj la monperdo ne estas tre grava. Se kontraŭe li interesiĝas, je la sesa aŭ sepa leciono li sentas la bezonon akiri vortarojn, kaj la profito de la vendo de tiuj ĉi libroj kovras la eldonelspezojn de la kurso. Poste li tre ofte interesiĝas pri la aktiveco de Kultura Centro Esperantista kaj fariĝas regula monkontribuanto kaj eĉ kunlaboranto por preciza laboro. La profito fine estas multe pli granda ol la monrisko.

Cl.- Ricevante multajn dokumentojn, la gelernantoj havas je sia dispono veran ekspozicion pri esperanto. Tiujn ĉi dokumentojn ili montras al familianoj, geamikoj kaj gekolegoj, kaj ĉar la kurso estas senpaga, ili facile rikoltas nomojn de interesatoj, kiujn ili sendas al Kultura Centro Esperantista. Tial ĉiutage alvenas almenaŭ unu nova adreso, kaj la nombro de la novaj lingvistudentoj kreskas.

A.- Bedaŭrinde tiu ĉi kurso ekzistas nur en la franca lingvo. Ni tre esperas povi baldaŭ eldoni italan adapton. Germanigo ne estas ebla, ĉar la programado por la franca lingvo ne povus konveni al la germana lingvo. La manko de similaj kursoj por la itala kaj germana lingvoj havas kiel konsekvencon, ke esperanto multe pli rapide disvolviĝas en franclingva Svislando, ol en la tri aliaj lingvoregionoj.

Cl.- Ni nun diru kelkajn vortojn pri la perflanela instruilo. Temas pri murtabulo, sur kiu algluiĝas vortetikedoj kaj bildoj. La flanelo de la tabulo malhelpas la faligon de la pormomente fiksita materialo. Tiel estas eble konstrui per vortelementoj kaj bildoj fraz-ĉenojn kaj poste intervenigi strukturŝanĝojn. Ni donu precizan ekzemplon. Unu bildaro rilatas al la ideo arbaro. La instruisto proponas la formadon de frazoj laŭ la ĉi-sekva strukturo : En la arbaro oni ... as ... ojn. Helpe de la verb-etikedoj kaj de la bildoj la gelernantoj proponas frazojn :

A.- En la arbaro oni aŭdas birdojn ; oni surprizas kapreolojn, sciurojn, leporojn kaj vulpojn ; oni kolektas fungojn : boletojn, kantarelojn ; oni segas arbojn ; oni konstruas sterojn ; oni sekvas padindikojn ; oni manĝas fragojn kaj frambojn.

Cl.- La instruisto proponas ekzercon. Je la komenco de la frazo li forprenas la vorton **oni**. Tiam la tuta frazaro submetiĝas al struktur-reformo. La verboj, kiuj estis transitivaj devas, helpe de la sufikso –iĝ ne-transitivigi. Jen la rezultato, kiu obeas al la ĉi-sekva frazmodelo : *En la arbaro ... iĝas ... oj :*

A.- En la arbaro aŭdiĝas birdoj ; surpriziĝas kapreoloj, sciuroj, leporoj kaj vulpoj ; kolektiĝas fungoj : boletoj kaj kantareloj ; segiĝas arboj ; konstruiĝas steroj ; sekviĝas padindikoj ; manĝiĝas fragoj kaj framboj.

Cl.- La programado antaŭvidas multajn tiajn strukturŝanĝajn ekzercojn kaj dum semajnfinaĵ aŭ feriaj kursoj instruistoj pretiĝas por gvidi tiajn kursojn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!